# Komunikoj

JARO 34-a | JANUARO - FEBRUARO - MARTO | N-ro 137 2010


"Amu vian Dion
per via tuta animo
kaj vian proksimulon
kiel vin mem."

Jesuo

**Naskiĝi, morti, renaskiĝi ankoraŭ kaj ĉiam progresi tia estas la leĝo.**

Foliumante la arkivojn de nia Eldonejo, surprize, verajn trezorojn, ĝis nun ne konatajn, ni trovis: psikografiajn mesaĝojn, en Esperanto, subskribitajn de Spirito nomata Esperantisto, per la mediumeco de nia karmemora fondinto Délio Pereira de Souza. Alia grava surprizo estas leteroj de Francisco V. Lorenz, en Esperanto, al brazilaj samideanoj, precipe al Ismael Gomes Braga. Ekde tiu ĉi numero, ni ilin aperigos sur la paĝoj de Komunikoj.

La Mediumeco de

**DÉLIO PEREIRA DE SOUZA** *



Délio

"La steloj brilas dum la nokto, kaj la suno brilas dum la tago. Miloj, milionoj da steloj brilas dum la nokto, sed ilia lumo ne tiel sufiĉas, kiel la lumo de la suno, por lumigi la Teron. Tiel same, ni havas multajn majstrojn, kiuj transdonis siajn instruojn, sed ni havas unu solan veran Majstron, Jesuon, la Kriston, kies instruoj, same kiel la suno, helas por lumigi la konsciencon de la tuta homaro. Do, ni serĉu la lumon de tiu granda Majstro, ni ellernu Lian instruon, kaj ni sekvu Lin per praktiko de Liaj lecionoj, tre diligente, tre detale. Kiel Maria, ni eksidu ĉe Liaj piedoj por aŭskulti ĉiutage Liajn instruojn, kaj ni akompanu Lin, kien ajn Li iru. Ni serĉadu Lin tage kaj nokte, ĉar Li estas la vera lumo, kiu lumigas nian animon. Jesuo estas en ni!"

Esperantisto

16/11/1992

* Naskiĝo: 23/12/1918 – Forpaso: 02/01/2009



"Kiam oni bruligas lampon, oni metas ĝin ne sub grenmezurilon, sed sur la lampingon; kaj ĝi lumas sur ĉiujn, kiuj estas en la domo"

Jesuo

Kara Samideano kaj Amiko Ismael Gomes Braga:



Lorenz kaj liaj du filoj: Paulo kun okulvitroj kaj Waldomiro en uniformo en 1947.

Kore salutante Vin kaj Vian ŝatindan Familion, mi deziras al Vi kaj al Viaj Pacon, Sanon kaj Feliĉon.

Via laste de mi ricevita letero estis skribita je la 20ª de Aŭgusto, kaj respondita de mi je la 14ª de la kuranta monato. Dum la pasinta semajno mi faris iom da verstradukoj, nome: La tradukon de la angla KANTIKO (A CAROL), kies originalon Vi afable estis sendinta al mi jam en Marto aŭ Aprilo; kaj tri poemojn de Martins Fontes (fama, mortinta antaŭ malmultaj jaroj). La originalojn mi trovis en libro, kiun estis donacinta al mi la anoj de la Grupo Esperantista de Santos. Ĉi-kune mi sendas al Vi la kvar poeziaĵojn: la tri de Martins Fontes mi ankaŭ sendas al la nomita Grupo, kaj mi aldonas por Vi la portugallingvan originalon.

Bedaŭrinde, en la KANTIKO, mi ne povis konservi plene la originalan metrikon, ĉar Esperanto ne posedas tiom da unusilabaj vortoj kiel la angla lingvo, kaj se oni volus havi ĉie (= en ĉiu versfino) virajn rimojn, la nombro de apostrofoj estus tro granda.

Dank' al Dio, mia sano refortiĝis, kaj mia edzino ankaŭ fartas pli bone. Pri mia emeritiĝo ankoraŭ nenio aperis.

Du el miaj filoj servas kiel soldatoj en P. Alegre: unu (Waldomiro) estas "aspirante-a-tenente", la alia (Paŭlo) estas "Cabo". Tria filo, (Carlos) verŝajne iros servi kiel rezervanto, ĉar la mobilizo jam estas dekretita.

Atendante Viajn sciigojn, mi restas Via dankema frato,

FVL

## KURIOZAĴOJ EL LA LETEROJ DE ZAMENHOF



Antaŭparolo al la Plena Vortaro rusa-internacia. (originalo kun signetoj)

Laŭ la deziroj de la amikoj de l' lingvo internacia mi decidis eldoni la plenan vortaron; kaj ĉar plej granda parto de la petantoj estas rusoj, mi eldonas la vortaron antaŭ ĉio en la lingvo rusa. Sed mi ripetas tie ĉi tion, kio estis jam dirite en la "Aldono al la Dua Libro"; la plena vortaro, kiun mi eldonas, devas esti nur helpo por tiuj, kiuj mem ne povas aŭ ne volas krei novajn vortojn; sed ĝi tute ne devas esti absoluta aŭtoritato por la amikoj de la lingvo. Sen ŝanĝo devas resti nur la vortoj, kiuj sin trovas en la malgranda vortareto (aldonita al la lernolibro); ĉiujn ceterajn vortojn mi donis en la plena vortaro en tiu formo, en kiu mi persone ilin ordinare uzas, kaj se la leganto trovos, ke tiu aŭ alia vorto estas kreita de mi ne bone, li povas uzi alian formon anstataŭ la formo kiun mi donis. (Sed estus tamen dezirata, ke tiaj aliformigoj estu farataj nur en okazo de efektiva neceso).

La aŭtoro

Al Majnov, 29.III.1889

Estimata Sinjoro! – La verkojn, kiujn vi petis, mi sendas al vi hodiaŭ. Por via bona deziro iri al la estro de la aferoj de l' preso mi dankas vin kore; sed mi petas vin faru tion ĉi t r e g a r d e, por ne malbonigi nian aferon kaj ne alporti al ĝi malutilon. Al simpla cenzuristo povas iri ĉiu, sed al la estro devas iri nur persono aŭ havanta certan gravan situacion en la societo, aŭ estanta kun li persone konata; ĉar la homoj ordinare rigardas ne la aferon, sed la personon, kaj se al la estro venos persono ne sufiĉe grava en liaj okuloj, tiam nia afero anstataŭ gajni – povas esti tute mortigita! Atendante de via laborado la plej feliĉan rezultaton, mi restas kun kora saluto.

Zamenhof

## TRE SPECIALA INVITO

Eldonejo Lorenz prepariĝas por la kongresoj de Esperanto en la bela Ŝtato Mato Grosso do Sul kaj por la Universala Kongreso, en Kubo. Se vi interesiĝos partopreni nian teamon, skribu aŭ telefonu al ni kaj kun certeco vi multe helpos nin. Tiu ĉi speciala invito ankaŭ celas niajn eksterlandajn samideanojn.

Skribu, telefonu al ni!

**Editora_lorenz@uol.com.br**
Tel. (21) **2221-2269**








## ĈU VI JAM REKOTIZIS POR 2009?

Ne perdu tempon, aliĝu tuj kaj ricevu, en la komforto de via hejmo: du librojn, Almanakon Lorenz 2010 kaj nian trimonatan bultenon. Helpu nin daŭrigi nian laboron por la triobla idealo: Evangelio, Spiritismo, Esperanto.

Koran dankon!

## JEN GRAVA LIBRO JE VIA DISPONO!




Se alilandaj gesamideanoj deziros ricevi, tute senpage, la libron *La Kialo de l' Vivo*, de la spiritista filozofo Léon Denis, skribu al ni kaj kun plezuro ni ĝin sendos al vi kaj al viaj geamikoj. Sufiĉas apenaŭ sciigi vian (ilian) adreson.

Ĝi pritraktas la kialojn de la vivo: "kio ni estas, de kie ni venis, kien ni iras, kiaj estas niaj destinoj. La ideoj, kiujn ni faras al ni pri la Universo kaj ties leĝoj, pri la rolo, kiun ĉiu el ni devas ludi sur tiu ĉi vasta scenejo, estas ja gravegaj, ĉar ĝuste laŭ tiuj ideoj ni starigas nian konduton, la celon de nia vivo, al kiu celo ni nepre marŝas".

Profitu la oportunon por agrabla kaj tre interesa studado.

LORENZ

**SPIRITISMA ELDONA ASOCIO F. V. LORENZ**
Rua dos Inválidos, n. 34, grupo 903
Caixa Postal 3133 - CEP 20001-970
Rio de Janeiro (Brasil)
Tel. (21) **2221-2269** <editora_lorenz@uol.com.br>

**www.editoralorenz.com**

## EVERARDO ADOLPHO BACKHEUSER

Alberto Flores

Naskiĝis en la urbo Niterói – RJ – je la 28ª/05/1879.
Mortis en la urbo Rio de Janeiro – RJ – je la 10ª/10/1951
Li vivadis dum 73 jaroj, 4 monatoj kaj 12 tagoj.



Geografia kaj civila inĝeniero (1901), universitata profesoro pri Mineralogio, Geologio, Geografio kaj Botaniko; elstara kaj aktiva pioniro pri la disvastigo de Esperanto tra Brazilo. Li estis Profesoro ĉe Nacia Inĝenier-Altlernejo; ĉe Katolika Filozofia Fakultato, kaj Instituto pri Pedagogiaj Serĉadoj. Everardo Backheuser prezidis Nacian Komisionon por Popola Edukado (de Ministerio pri Edukado kaj Sano); Brazilan Katolikan Konfederacion pri Edukado; Brazilan Esperanto-Ligon. Li kunfondis Brazilan Akademion de Sciencoj, de Niterói – RJ. Je la 29/06/1906 li kunfondis Brazilan Klubon de Esperanto – Niterói – RJ, kaj li estis ĝia unua prezidanto. Je la 21/07/1907 li estis kunfondinto de Brazila Ligo Esperantista (poste BEL, Brazila Esperanto-Ligo), kune kun Alberto A. Oliveira kaj Reynaldo Geyer. Backheuser reprezentis Brazilon ĉe la IV Universala Kongreso de Esperanto, kiu okazis en Dresden-Germanio (16-22/08/1908). Tie li havis la feliĉon koni D-ron L. L. Zamenhof. 1909 – Membro de la Lingva Komitato (poste Akademio de Esperanto). 1910 – Honora Prezidanto de Brazila Esperanto Ligo. 1936 – Direktoro de Instituto de Edukadaj Serĉadoj. 1939 – Konsilanto de IBGE (Brazila Instituto de Geografio kaj Statistiko). 1954 – Prezidanto de la Komisiono de Popola Edukado de la la Brazila Instituto de Katolika Edukado. Li verkis artikolojn kaj publikaĵojn pri Mineralogio, Geologio, Geografio, Antropologio, Geopolitiko, Edukado kaj Pedagogio. Backheuser, per la ĵurnalo O Paiz – Rio de Janeiro (1906), faris intensan propagandon pri Esperanto, kaj li publikigis e-kurson en tiu ĵurnalo. Homo tre klera kaj bone konanta Esperanton, li estis ankaŭ brila kaj elokventa oratoro. En Parizo-Francio li faris (08/12/1908) paroladon pri Brazilo, en Esperanto, ĉe Societo de Geografio. Prezidis la kunsidon S-ro Gabriel de Pizza, plenrajta Ministro de Brazilo en Francio. Ĉeestis famaj francaj esperantistoj, kiel Generalo Hippolyte SEBERT, Profesoro Théophile CART kaj Profesoro Carlos BOURLET. Poste, la paroladon, sub la titolo BRAZILIO, publikigis la Eldonejo Libraria Hachette & Cia. – Paris-1909, kiel parton de la "Kolekto de LA REVUO". Je la 23ª/05/1952 oni inaŭguris straton "Profesoro Enĝeniero Everardo Backheuser" ĉe la antaŭurbo Méier – Rio de Janeiro – RJ.

# Amikoj de nia Eldonejo

Jen tre kara Amiko, Frato kaj Samideano Milorad Djurdjevic, el Serbio, kaj lia simpatia familio.

Koran dankon, Milorad, pro via sincera amikeco!



Milorad estas la unua de dekstre.

## VERE

Sanktulo ne kondamnas pekinton, sed helpas lin sen aroganteco.

Klerulo ne mokas senklerulon, sed lin frate instruas.

Iluminito ne insultas homon, irantan en mallumo, sed heligas al li la vojon.

Instruisto ne akuzas senspertan lernanton. Ŝafo malfirmpaŝa ja la plej bezonas paŝtiston.

Bonkorulo ne persekutas maliculon, sed helpas lin pliboniĝi.

Forta ne riproĉas malfortan, sed helpas lin stariĝi.

Humilulo ne evitas fierulon, sed silente kunlaboras favore al li.

Sincerulo neniun konfuzas, sed ĉiujn harmoniigas inter si.

Modestulo ne kritikas vantemulon, sed silente helpas lin, kiam necese.

Kristano ne malamas nek vundas, sed sekvas la Kriston, servante al ĉiuj.

Alie ĉio, kion ni titolas per "virto", estas nenio krom eksteraĵo, kiun la tempo detruas.

Libro: Kristana Agendo
Mediumo: Francisco Cândido Xavier
Spirito: Andreo Ludoviko

## SPIRITISMAJ LIBROJ EN LA RETPAĜO DE BSF

Jen grava oportuno por koni Spiritismon: en la retpaĝo de Brazila Spiritisma Federacio, jam legeblas spiritismaj libroj, en Esperanto: La Libro de Spirito, La Evangelio laŭ Spiritismo, La Genezo, La Libro de la Mediumoj, Memoraĵoj de Sinmortiginto, Paŭlo kaj Stefano kaj aliaj. Ne perdu tempon, restu laŭplaĉe, kaj bonan studadon!

**www.febnet.org.br/site/estudos**




## LANĈO




**Confissões de um Jovem Espírita**

José Carlos Leal

14 x 21 cm – 168 páginas

**R$15,00**